## GVIDREZOLUCIO de la 82-a SAT KONGRESO

La 82-a Kongreso de SAT kunvenanta en Milano inter la 18-a kaj la 24-a de julio 2009,

— instigas la membrojn al akurata pago de kotizo por ebligi bonan funkciadon de la asocio per adekvata financado,

— konstatas la bonkvalitan laboron de la Eldona Fako Kooperativa de SAT kaj instigas SAT-anojn partopreni en ĝiaj eldon- kaj disvendoreto, en la koherigo de ĝia eldonpolitiko kaj en la klarigo de ĝia funkciado,

— esprimas sian aprezon al la sukcesaj laboroj ĝis nun jam plenumitaj pri la elektronika PIV kaj kuraĝigas la laborgrupon, kiu prizorgas ĝin, daŭrigi,

— alvokas al utiligo de la pretigata flugfolio pri SAT,

— invitas ĉiujn kamaradojn informi la membraron pri la situacio en siaj respektivaj mondregionoj per Sennaciulo, kaj emfazi la tutmondan rolon de SAT per kontaktiĝoj inter esperantistoj de diversaj mondpartoj por riĉigi sian klerigan laboron,

— instigas la kamaradojn kontribui al la SAT-retejo per sendado de materialo al ĝia respondeculo ĉu per rekta enretigo de originala materialo ĉu per traduko de la artikoloj troviĝantaj en la nacilingva parto (aparte koncerne tekstojn Kio estas SAT kaj Kio estas Esperanto),

— instigas SAT-anojn kontribui al Sennaciulo kaj Sennacieca Revuo per verkado kaj sendado de artikoloj aŭ bildoj kaj per kontribuo al la redaktoskipo per diversaj taskoj inkluzive de kunlabora enpaĝigo,

— proponas sistemigi per tradukreto la proponadon kaj tradukadon de nacilingvaj SAT-ece klerigaj tekstoj,

— petas, ke en la landoj subskribintaj la Konvencion de Oslo kontraŭ la pafaĵoĵetoj el bomboj kaj ĉie, kie eblas, la kamaradoj intervenu ĉe siaj regantoj, por ke ilia lando rapide ratifu tiun konvencion, kaj ke en ne subskribintaj landoj la kamaradoj intervenu ĉe siaj regantoj por ke ilia lando rapide subskribu kaj ratifu tiun Konvencion,

(daŭrigo paĝo 11)

### ***Resolution*** *(for internal guidance)* ***of the 82nd SAT Congress***

*This resolution expresses the wishes of the congress on the way in which the committee should run SAT. It also makes proposals for the membership and affiliated, supportive, or otherwise linked organisations.*

*It covers arrangements for publications, calls for local action to persuade more governments to sign the Oslo Convention on cluster bombs etc., and various administrative matters including publicity.*



**Gazeto de Sennacieca Asocio Tutmonda en Britio**

# La Verda Proleto

**Journal of Workers' Esperanto Movement (SATEB)**

Numero 432 ~~~ Septembro 2009

## DEKLARACIO de la 82-a SAT-KONGRESO

- La 82-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), kunvenanta en Milano de la 18-a ĝis 24-a de julio 2009, substrekas, ke ĝia Statuto instigas la membrojn de SAT agadi sur diversaj terenoj. Ĉi-jare, la kongresa temo estis « Migri senlandlime, vivi sennaciece ». La kongresanoj de SAT, gastigitaj de la frata itala asocio ARCI Esperanto, debatis pri paco, hommigrado, etikaj bankoj, situacioj en Sudameriko, Malagasio, Mezoriento kaj aliaj mondregionoj.
- La Kongreso
- — rememorigas al la Ambasadoroj de Ĉinio, Finnlando, Hindio, Israelo, Pakistano, Rusio kaj Usono, ke de pluraj jaroj SAT skribis por peti, ke tiuj landoj subskribu la Konvencion de Otavo. Ĝis nun, neniu el tiuj landoj subskribis ĝin. Denove, SAT firme petas, ke rapide ili subskribu tiun Konvencion de Otavo,
- — emfazas la rajton de la homoj el la tuta mondo memstare kaj libere elekti vivi kaj loĝi tie, kie ili naskiĝis aŭ kie ajn estas al ili plej taŭge pro naturmediaj kialoj, profesiaj, politikaj aŭ aliaj bezonoj, konsiderante sennaciece kaj senlandlime siajn proprajn interesojn kaj ankaŭ tiujn de la tuta homaro,
- — interesiĝas pri la projekto krei en 2010 Eŭropan Etikan Bankon (EEB) per kunfando de tri nunaj etikaj bankoj (Banca Popolare Etica el Italio, NEF el Francio kaj FIARE el Hispanio), konsiderante, ke tiu banko verŝajne agos per pli etikaj rimedoj ol aliaj bankoj,
- — rekonas en la agado de ARCI, itala laborista kulturcela asocio, komunajn agadspiriton kaj klerigajn celojn, kaj kuraĝigas la membrojn de SAT memstare partopreni en ĝia agado kaj tiel prepari ontan interasocian kunlaboron,
- — agnoskas la gravecon de la malfacilaĵoj i.a. estigitaj de naciismo kaj kapitalismo, kiujn renkontas homoj en iuj mondregionoj kiel Sudameriko, Malagasio kaj Mezoriento, kaj celas klerigajn interŝanĝojn kun tiuj homoj por antaŭenigi nian komunan emancipiĝon.

### *Declaration of the 82nd SAT Congress*

*- an English translation appears on page 6*

# * S.A.T.E.B *

WORKERS'ESPERANTO MOVEMENT

Prezidanto / *Chairperson* Mrs. Pearl Simons, 'The Cottage' 34 Beaulieu Drive, PINNER, Middx HA5 1NG Tel: 020 8429 3531

Sekretario / *Secretary*: David Kelso 5 Craigenhill Road, Kilncadzo, Carluke, ML8 4QT Tel: 01555 759166 <davidekelso@yahoo.co.uk>

Kasisto / *Treasurer* Arturo Prent, 7 Walton Gardens, Hutton, BRENTWOOD, Essex CM13 1EJ Tel: 01277 228962 <arturo@signalprent.demon.co.uk>

**La Verda Proleto** Redaktoro / *Editor* Laura Miller, 68 Etherly Rd, LONDON N15 3AL Tel: 020 8800 5120 <lauramiller1216@hotmail.com>

**Pri la enhavo de kontribuaĵoj respondecas nur la aŭtoroj mem.**
***Views expressed by contributors are the responsibility of the authors alone***

**REDAKTORO / *EDITOR***

La komitato bonvenigas Laura Miller kiel redaktoro
*The committee welcomes Laura Miller as editor*

**KOTIZOJ / *SUBSCRIPTIONS***

**La SATEB-kotizo por 2009 estis pagenda en januaro.**
**Se vi ankoraŭ ne pagis, bonvolu tuj pagi.**
***The SATEB subscription for 2009 was due in January.***
***If you haven't yet paid please do so now***
Detaloj kaj formularo je paĝo 9 / *Details and form on page 9*

**La SAT-kotizo por 2010 pagendos en januaro (vidu paĝon 10).**

**SATEB - Jarkunveno 2009 / *SATEB - AGM 2009***

**Por kuraĝigi partoprenon, la komitato pagos al la unuaj ses membroj, kiuj tion petas, duonon de la vojaĝkostoj (maksimume £50).**
***To encourage attendance, the committee will pay, to the first six members who ask for it, half their travel costs (maximum £50).***

**DANKON -** Ni daŭre dankas al Paul Gubbins pro lia zorga kontrolado de LVP.
**THANK-YOU** - We are always thankful to Paul Gubbins for his conscientious checking of LVP

**LVP 433** Kontribuaĵoj invitataj - limdato 31-an de decembro 2009
*Contributions are invited - to reach us by 31st December 2009*



**GVIDREZOLUCIO de la 82-a SAT KONGRESO** (daŭrigo de paĝo 12)

— plu vokas SAT-rondojn, SAT-frakciojn, LEA-ojn kaj SAT-anojn sendi precizajn informojn pri kursoj, varbado direktita al ekster-SAT-a medio kaj apero de artikoloj pri Esperanto aŭ SAT-rilataj temoj,

— sugestas kunvoki laborgrupon por prepari, per kolektado kaj debatigo de ideoj, deklaracion de SAT pri ties rolo en la nuna epoko,

— invitas SAT-anojn informiĝi pri etikaj bankoj kaj pli precize pri la projekto de Eŭropa Etika Banko (EEB) kaj jam nun utiligi Esperanton en tiu banka medio per diversaj rimedoj (i.a. esperantigo de la fondmanifesto, flugfolioj kaj retejaj dokumentoj),

— invitas la Plenum-Komitaton studi la fondmanifeston de EEB kaj aliajn similajn iniciatojn, kaj eventuale proponi membriĝon de SAT post referendumo en tia kooperativa banko,

— petas la Plenum-Komitaton zorgi, ke en la venonta kongreso estu antaŭvidita ebleco organizi klerigsesiojn pri financaj demandoj.

## 83-A SAT KONGRESO 2010

La kongresoj estas unu el la ĉefaj agadoj en SAT. Ili daŭras unu semajnon, kaj kombinas jarkunsidon kun multaj eblecoj informiĝi kaj diskuti pri progresemaj aferoj, kaj kun iom da turismo. La jarkunsido estas multe pli ampleksa ol en aliaj asocioj, ĉar, laŭ statute, SAT-anoj rekte partoprenas en la direktadon de la asocio.

La tempo kaj loko ankoraŭ ne estas decidita.

### *83rd SAT Congress 2010*

*These congresses are one of SAT's main activities, combining AGM activites with plenty of opportunities to hear about and discuss progressive issues and with some tourism as well. The participants will come from many different parts of the world, so the programme will be in Esperanto only, the working language of SAT. Also the volunteer organisers can only deal with their local language and Esperanto. For practical reasons, a sufficient knowledge of Esperanto is required by all those not accompanied by an Esperantist.*

*The time and venue for the 2010 congress have not yet been fixed.*

~~~~~

## Vortoj de Zamenhof pri laboristoj

" Eble por neniu en la mondo nia demokrata lingvo havas tian gravecon, kiel por la laboristoj, kaj mi esperas, - ke pli aŭ malpli frue la laboristaro estos la plej forta apogo de nia afero. La laboristoj ne sole spertos la utilon de Esperanto, sed ankaŭ pli ol aliaj sentos la esencon kaj ideon de la esperantismo. "
~~~~~

# Sennacieca Asocio Tutmonda - SAT

Tutmonda forumoj, rektaj kontaktoj - per tiuj SAT celas antaŭenigi informadon kaj interkomprenon inter laboristoj kaj progresemuloj, por helpi forigi maljustecon ktp.

SAT uzas la racie elpensitan lingvon **- Esperanto -** por atingi siajn celojn.

*Worldwide forums, direct contacts - by these S.A.T. aims to promote knowledge and understanding amongst workers and progressives to help overcome injustice etc. - using the rational language **Esperanto** to achieve its aims.*

La demokrata strukturo de SAT estas inter-membra, ne inter-"nacia".
*SAT's democratic structure is based on members, not on national boundaries.*
*Note that the worldwide nature of SAT means that only Esperantists may join.*

SAT kongresas ĉiujare en diversaj mondo-partoj, "Sennaciulo" aperas preskaŭ ĉiumonate, "Sennacieca Revuo" (literatura revuo) aperas jare. Adresaro (regule ĝisdatigita) ebligas rektajn kontaktojn inter la anoj. SAT eldonas librojn kaj broŝurojn kongrue al la celoj, kaj laŭnecese vortarojn, aliajn librojn, ktp.

**Membro-kotizo: £35**. Membroj ricevas "Sennaciulo"-n, "Sennacieca Revuo"-n, kaj adresaron, kaj rajtas pagi rabatan kongres-kotizojn.
(Minimume £18 por tiuj kiuj vere ne kapablas pagi la plenan kotizon)
**Dumviva membreco** nun havebla - **£875** - rabato ne haveblas.
Nemembroj rajtas aboni al "Sennaciulo" kun "Sennacieca Revuo" kontraŭ £40.
Sendu monon (se en britaj pundoj) al la peranto, ne al SAT.

Oficejo: SAT, 67 Ave Gambetta, F-75020 Paris, France. Retadreso: <satesperanto@free.fr> TTTpaĝo:<http://www.sat-esperanto.org>

**Uzu la suban formularon por informpetoj kaj pagoj por Britio**, kaj sendu al la peranto: Arturo Prent, 7 Walton Gdns, Hutton, Brentwood, Essex, CM13 1EJ
(Ĉekoj pagendaj al "SAT") Retadreso: arturo@signalprent.demon.co.uk

*tranĉu* >- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

***Sendu al la peranto (vidu supre)***

☐ Bonvolu sendi pli da informo pri SAT ☐ Bonvolu sendi aliĝdeklaron ☐ Bonvolu sendi informon kaj aliĝilon por la SAT-Kongreso

☐ Realiĝo / abono Dato ____________________

Nomo ____________________________________________

Adreso ____________________________________________

____________________________________________

(nedevigaj)-> tel: ____________________________________________

retadreso: ____________________________________________

☐ Marku, se ni rajtas sendi viajn detalojn al aliaj Esperanto-organizaĵoj

Mi kunsendas:- kotizon £_______+ donacon*£________sume:- £_________

per ĉeko/poŝtmandato/______________ (ĉekoj al "SAT.")

*celo por donaco________________________________



## SATEB-jarkunsido 2009 / *AGM 2009*

**La jarkunsido de SATEB okazos je 14.00, la 24-an de oktobro, ĉe:**
***The SATEB AGM will be held at 2.00 pm on the 24th of October at:***

**Wedgwood Memorial College**
Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DG

### Tagordo / *Agenda*

1. **Enkonduko (*Introduction*)**
2. **Pardonpetoj (*Apologies*)**
3. **Protokolo de la pasintjara jarkunsido (*Minutes of the last AGM*)**
4. **Raporto de la komitato (*Committee report*)**
5. **Kasraporto (*Treasurer's report*)**
6. **Membraro (*Membership*)**
7. **La Verda Proleto**
8. **Publico (*Publicity*)**
9. **SAT**
10. **Estonteco de SATEB (*Future of SATEB*)**
11. **Balotoj (*Elections*)**
12. **Aliaj aferoj (*Any other business*)**

La kunveno okazos en Esperanto

*The meeting will be conducted in Esperanto.*

Por ke vi havu pli profitdonan semajnfinon, la kunveno okazos kadre de Drondo 4 (Diskut-rondo), organizata de Derek Tatton.
La temo por sabatmatene estas **"La Monda Ekonomia Krizo"**

**Vi rajtas veni nur por la jarkunveno,** sed se vi volas refreŝaĵojn, aŭ tranokton, tion vi devos aranĝi kun la kolegio (adreso supre).

Se vi ne jam aliĝis, kaj aliĝilo por Drondo 4 ne troviĝas kun LVP, bonvolu peti de la kolegio (adreso supre).

Se pro manko de spaco en la kolegio necesos loĝi ekstere je pli alta kosto por simila komforto, SATEB pretas pagi la diferencon.

*To allow you to have a more productive weekend, the meeting is part of ODD4 (Open Democracy Discussion Circle), organised by Derek Tatton. The subject for Saturday morning is "The World Economic Crisis"*

***You may come to the AGM only**, but if you want refreshments, or to stay overnight, you must arrange this with the college (address above).*

*If you haven't already enrolled, and the leaflet with application form for ODD4 is not with LVP, please contact the college (address above).*

*If through lack of space in the college you have to stay outside at greater cost (for similar facilities), SATEB is prepared to pay the difference.*

## Sane - malsane - usone

De Londono mi de flanke aŭskultas seriozan debaton pri sanservoj, misinformo, senhontaj mensogoj kaj firetoriko. Kiam 47 milionoj da usonanoj neniom ricevas sanzorgon, oni supozus, ke malpli gravas la ideologio ol la vivo. Ŝajne ne- kaj plimulto da britoj verŝajne ne konstatas, kiom timige estas malsani en Usono.

En 1987 mi reiris Usonon. Mi estis instruisto: feliĉe, ĉar la instruista sindikato sufiĉe fortis por prinegoci bonajn kondiĉojn kun la municipo. Fine mi elektis sistemon similan al la brita (NHS). Estas kuracisto "'pordista", kiu ja konas vin; nepras permeso de la asekurkompanio por farigi ion sen konsulti tiun ĝeneraliston. Mi bonŝancis, havante bonegan ĝeneraliston kaj tre bonajn specialistojn, kiam mi pliaĝiĝis kaj diversaj korpopartoj ekpaneis.

Pri medikamento decidas la kompanio, al kiu ligiĝas via asekuro; dependas de kosto. Foje iu medikamento tute malaperas ĉar la kompanio taksas ĝin tro kosta; se vi bezonos ĝin, fi, krom se vi kapablas pagi la tutan koston. Amikino mia en Novjorko ekhavis mamkanceron. La tuberektomio, konsultado, kemi- kaj radioterapio, kaj postkuracado, kostis al ŝi milojn da dolaroj, malgraŭ la asekuro. Kaj ŝi devis daŭre instrui, ĉar se ŝi ĉesus instrui, tuj ĉesus la asekuro.

Iame, vizitante Novjorkon, mi kaptis gravan infekton. Mi pasigis dek tagojn en hospitalo, enlite la tutan tempon, inter antibiotikoj kaj analgezikoj. Tempaltempe vizitis min kuracistoj, sed neniam la samaj - kaj ili volis ke diru mi al ili kion diris la antaŭa kuracisto. Neniam mi vidis dufoje saman flegiston.

Iom resaniĝinte kaj hejmenironte, mi ricevis fakturon pri $25,000. Tamen mi estis bonŝanca, kaj kompetenta pri esplorado. Post kelkaj horoj da telefonado, mi malkovris, ke Novjorko havas fonduson por vizitantoj, kiuj trafas veran urĝbezonon. Ĉiun cendon pagis la novjorka municipo, benatu estu ĝi. Tamen, nur ĉar mi estis vizitanto.

Karega amikino mia en Anglio ricevas dializon trifoje semajne kaj atendas novan renon. Ŝi scias ke atendo por reno povus daŭri ĝis tri jaroj, ne pro ŝia aĝo sed ĉar renoj ne tiom disponeblas. Tamen, malriĉo ne malebligas, ke oni ricevu renon - malkiel en Usono.

Mi scias, ke estas problemoj en la brita sanservo (NHS) kaj ke dentokuracado terure malbonstatas. Malgraŭ ĉio, konsidere miajn spertojn en ambaŭ landoj (kaj kredu min, mi estas unu el tiuj, kies korpo ŝajne paneas laŭ senescepta programo) mi scias, kie mi volas esti, kiam mi malsanas - ĝuste tie ĉi en Britio, kun la NHS.

**Laura Miller**



# SATEB

## *WORKERS' ESPERANTO MOVEMENT*

Sennacieca Asocio Tutmonda en Britio celas "diskonigi kaj instrui la internacian lingvon Esperanto kaj antaŭenigi la ideojn de S.A.T."
- celas venigi Esperanton al ĉiuj progresemaj organizoj.
*SATEB - aims "to make known and teach the international language Esperanto, and promote the ideas of SAT."*
*- aims to bring Esperanto to the notice of all progressive organisations.*

Por informo pri SAT bonvolu vidi la venontan paĝon.
*For information about S.A.T. please see the next page.*

SATEB estas sendependa de SAT, sed aktive subtenas ĝin per disvastigo de informoj pri ĝiaj principoj kaj laboro, kaj per organizado de kunvenoj ĉiujaraj. SATEB *is independent of S.A.T., but actively supports it by spreading information about its principles and work, and by organising yearly meetings.*

**Por pli da informo** bonvolu sendi la suban formularon al la sekretario:
***For further information** please send the form below to the secretary:*
David Kelso 5 Craigenhill Road, Kilncadzo, Carluke, ML8 4QT
aŭ **retu** al / *or **email** to*: <arturo@signalprent.demon.co.uk>

Membrokotizo, inkluzive / *Membership, including* : 'La Verda Proleto': £7.00
(tiuj kun malaltaj enspezoj -minimume / *those with low incomes -min.* : £3.00)
(Abono nur por / *Subscription only for* : 'La Verda Proleto': £5.00)

Realiĝoj:- sendu formularon kaj pagon al la kasisto (adreso p. 3)
*Renewals:- send form and payment to treasurer (address on p. 3)*

*cut* > - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - < *tranĉu*

☐ *Information request* Informpeto  ☐ *Please send membership form* Bonvolu sendi aliĝilon  ☐ *Renewal* Realiĝo

*Name* / Nomo ____________________

*Address* ____________________

/ Adreso ____________________

(*optional* / } *Phone* / Telefono ____________________

nedeviga )} *email* / retpoŝto ____________________

*You may send my details to other Esperanto organisations* ☐
Vi rajtas sendi miajn detalojn al aliaj Esperanto-organizaĵoj

*I enclose* / : } *membership* / kotizon £_________ *donation* / donacon £_________
Mi kunsendas } *subscription* / abonon

*Date* / dato____________________ *Total /* Sumo: £__________

*cheque/PO/other* ______________ ĉeko/poŝtmandato/alia______________

*cheques etc. payable to* / ĉekoj ktp. pagendaj al "SATEB"

## **Ĉerpaĵoj el la per-reta SAT-diskuto: - Honduro**

La 28-an de junio 2009, okazis en Honduro puĉo kontraŭ la konstitucie balotelektita prezidento Zelaya: li estis sendita aviadile al Kostariko, kaj tuj poste la hondura parlamento leĝe pravigis la puĉon, per jena argumento: kadre de la novaj balotoj (laŭkonstitucie devis esti tri, do tri urnoj), kiuj devis okazi tiun saman tagon, la prezidento Zelaya starigis kvaran urnon por peti opinion de la civitanoj pri ĉu ili favoras aŭ kontraŭas starigon de Konstitucia Asembleo, kio - laŭ la argumento de la parlamento - estas kontraŭkonstitucia.

Necesas tamen klarigi, ke Zelaya decidis starigi tiun opini-sondilon por atingi tion, ke la politika reĝimo estu malpli sub premo de korupto. La proponita starigo de Konstitucia Asembleo, kies celo estus verki novan konstitucion, devus esti la rimedo por fini la nunan politikan reĝimon plenan je korupto. Efektive, de lia alveno en la prezident-postenon, Zelaya, kies politika aparteno estis konservativa, iom post iom starigis politikon - sekvante la evoluon nun disvolviĝantan en tiu mondo-parto - kiu celas plibonigon de vivkondiĉoj de granda parto de la socio de Honduro: la plej malriĉa. Ĉi tiu agado evidente post iom da tempo nepre devis kolizii kun interesoj de la grupo de ter- kaj industri-mastroj kaj eklezia kaj politika elitoj, kiuj lanĉis la puĉon helpe de la militistaro, kiu restis tre politke konservativa.

De pli ol du monatoj- estas rezista movado, kiu petas per neperforta agado revenon de Zelaya en sian postenon, respekton de la Konstitucio, kaj pli justan socion.

Laŭ tio kion mi komprenas, lastatempe estas metita la ideo pri ĝeneralaj balotoj, organizotaj de la puĉinta reĝimo. Ĉi tiujn balotojn rifuzas la kontraŭpuĉisma movado, ĉar novaj balotoj devas organiziĝi en konstitucia kadro, al kiu ne apartenas la puĉinta reĝimo.

Ĉu iuj el vi havas kontaktojn kun homoj el Honduro, kiuj povus verki ion pri la tiea situacio, aŭ ĉu el viaj kontaktoj vi povus trovi iun kiu pretas atesti pri kio li/ŝi vidis/aŭdis/komprenis?

Honduro estas malgranda lando, sed la eĥoj de tiu puĉo tra la mondo povas esti grandaj: estas nuntempe disvolviĝanta sama propagando kontraŭ la kontraŭpuĉisma movado, kiel disvolviĝis la propagando kontraŭ prezidento de Venezuelo Chavez, kiam li petis ŝanĝon de la konstitucio por ebligi al li refoje kandidatiĝi por plu esti prezidento kaj plu disvolvi sian politikon.

Se vi havas iun ajn materialon, bv sendi kaj kundvidi kun ni. Laŭstatuta celo de SAT estas emancipiĝo. Jen en iu mondoparto, tuta emancipa movado disvolviĝanta. Ties klopodoj, malfacilaĵoj kaj atingoj estas utilaj por diskonigi al aliaj mondopartoj kaj al kamaradoj, kiuj celas saman emancipiĝon.

Kial ne kolekti sufiĉe da materialo por baldaŭ fari malgrandan dosieron en Sennaciulo?

Kamaradece, Robin BETO.

~~~~~

Ĉi tiu ĉerpaĵo estas ekzemplo de la enhavo de la SAT-diskuto.(kun gramatikaj korektoj). Anoj de SAT povas vidi la tutan gamon. Por aliĝi al SAT, vidu p. 10.

*A sample from the SAT email discussion group: - about the coup in Honduras. The group is open to SAT members, and is in Esperanto - the language of SAT*



## ***In sickness and in health…***

*I have watched from London as disinformation, outright lies and tub-thumping have taken the place of serious discussion about health care in the US. With 47 million Americans without health care, one would think life was important. Apparently not; and most Brits do not seem to understand how frightening being ill is in the States.*

*In 1987 I went back to the States. I was a teacher: luckily, because the Teachers' Union negotiates good conditions with the City. I chose to have a "gatekeeper" doctor, a GP who knows you; but you still you have to get permission from the company to have anything done apart from a GPs visit. I had an excellent GP and extremely good specialists, as I got older and parts of me started breaking down.*

*Medication is decided on by the company your insurance is with; it depends on the cost. Sometimes medications disappear totally because the company thinks they are too expensive; if you need it, well, tough, unless you can afford the full cost. A friend in New York developed breast cancer. The lumpectomy, doctor's visits, chemo and radiation therapy, and aftercare cost her thousands of dollars, even with insurance. And she had to keep on teaching because if she stopped, her insurance would cease immediately.*

*Once, visiting New York, I got a major infection. I spent ten days in hospital, with antibiotics and painkillers. I saw never the same doctor twice- and they wanted me to tell them what the previous doctor had said; and never the same nurse either.*

*When I was feeling better, I got a bill for $25,000. I discovered though that New York has a fund for visitors who have a genuine emergency. I was a visitor from England, so every penny was paid by the City of New York, bless their cotton socks.*

*A close friend in England is on dialysis, awaiting a new kidney. She knows it could take three years – not because of her age, but because kidneys aren't easily available. But being poor doesn't stop you getting a kidney - as in the States.*

*I know the NHS has problems, and dentistry has no teeth. (!). But given my experiences in both countries (and my body breaks down with unfailing regularity) I know where I want to be when I am ill - right here in Britain, with the NHS.*

***Laura Miller***
~~~~~

## ***Declaration of the 82nd SAT Congress***

*(translation of the front page)*

- *The 82nd Congress of SAT (World Anational Association), which convened in Milan July 18th - 24th 2009, emphasizes that its statute encourages the members of SAT to be active in various fields. This year, the congressional theme was Roam Without Borders, Live Anationally. SAT's members who attended the congress, hosted by the related Italian association ARCI Esperanto, debated about peace, migration, ethical banking, situations in South America, Madagascar, the Middle East and other regions of the world.*
- *The Congress*
- *— reminds the ambassadors of China, Finland, India, Israel, Pakistan, Russia and the United States that for many years SAT has written to request that those countries sign the Ottawa Treaty. Up to now, none of those countries have signed it. SAT firmly requests that they sign the Ottawa Treaty without delay.*
- *— emphasizes the right of people everywhere in the world independently and freely to choose to live in the region where they were born, or wherever is most suitable for them, based upon environmental, professional, political and other factors and needs, considering their own interests and also those of mankind without concern for national or other boundaries.*
- *— is interested in the project to create the European Ethical Bank (EEB) in 2010, by merging three currently operating ethical banks (Banca Poplare Etica in Italy, NEF in France and FIARE in Spain), based upon belief that the bank will use more ethical means than other banks.*
- *— recognizes in the activities of ARCI, an Italian workers' cultural association, a common working spirit and same educational goals, and encourages the members of SAT independently to participate in its activities and so prepare for future collaboration between the two associations.*
- *— acknowledges the importance of the difficulties such as those caused by nationalism and capitalism, which face peoples in regions of the world such as South America, Madagascar and the Middle East; and aims for educational interchanges with these peoples to further our common emancipation.*

~~~~~

## ***What Zamenhof said about workers***

*"Probably for nobody in the world has our democratic language more importance than for workers and I hope that sooner or later they will become the strongest support of our cause. Not only do the workers understand the utility of Esperanto, but they more than others feel the essence and ideas of Esperantism."*



LabourStart **(http://www.labourstart.org/eo/)**

**Kie sindikatanoj komencas sian tagon sur la reto** **Tutmondaj sindikataj novaĵoj**

La esperanta ttt-paĝo de la sindikata ttt-paĝaro prizorgata de Eric Lee daŭre funkcias. Ĝi ĉiam bezonas pli da ret-ligataj helpantoj, kiuj kapablas resumi esperante anglalingvajn artikolojn.

Se vi opinias, ke vi povos helpi, aŭ konas iun, kiu eble povos, bonvolu kontakti: Paul Hewitt <paul@esperanto.freeserve.co.uk>

Intertempe, ni tre dankas al Paul Hewitt, David Curtis, Alwyn Kind kaj la Grimsby Esperanto-Grupo pro iliaj ĝisnunaj laboroj

### Tutmondaj sindikataj novaĵoj

Britio Okupado de la laborejo 02-Sep-2009

Suda Koreo Aŭtolaboristoj 02-Sep-2009

Mondo Okupado disvastiĝas 02-Sep-2009

Koreio Mesaĝo de Koreaj amaskomunikilaj laboristoj 14-Aug-2009

Venezuelo Alvoko al internacia solidareco kun la laboristoj de okupitaj fabrikoj 14-Aug-2009

Japanio Kontraŭbatalu, japanaj laboristoj 14-Aug-2009

Argentino Malebligu la fermon de IMPA – fabriko mastrumata de laboristoj 14-Aug-2009

Honduro Subtene al Honduraj laboristoj 11-Aug-2009

Meksiko Ministoj strikas 10-Aug-2009

Aŭstralio Sindikatoj bonvenigas la Laborpartion 10-Aug-2009

Honduro Instruistoj strikas 22-Jul-2009

Unu raporto el la granda paĝaro:-

### Alvoko al internacia solidareco kun la laboristoj de okupitaj fabrikoj en Venezuelo

- Freteko (Freteco), 11an de majo 2009

Ni sendas alvokon al la Venezuelanoj, al la internacia laborista klaso kaj al ĉiuj, kiu subtenas la batalon de la laboristoj por ilia emancipo, por ke ili sendu mesaĝojn al prezidento Ĉavo (Chavez) por peti la akiron de Acerven sub laborista regado, por ne lasi Invevalon en la manoj de la kapitalisma merkato, kaj por fini la burokratan sabotadon, la akiron ankaŭ de Gotcha, INAF, MDS kaj Vivex, kaj plenan esploradon pri la mortigo de Argeniso Vaskezo (Argenis Vazquez).

Ne al burokrata sabotado kontraŭ Invevalo !

Naciigon de la okupitaj fabrikoj !

Sindikataj respondeculoj ne plu estu murditaj !

*< La detala alvoko sekvas >*

*(Labourstart is a web site for trade union news. It has reports in Esperanto as well as many other languages.)*
~~~~~